

Heinrich Heine,

## Lorelej

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

Ne scias mi, kial subita  
malgaj' en la koro naskiĝis;  
el tempo jam enterigita  
legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas l' aero,  
la Rejno mallaŭte babilas,  
per oro de l'sun' en vespero  
la supro de l' monto rebrilas.

Plej belan knabinon mi vidas:  
en ora ornamo brilante,  
sur supro de l' monto ŝi sidas,  
la harojn mistere kombante.

La oran kombilon ŝi movas  
kaj kantas tra l' pura aero,  
kaj forto mirinda sin trovas  
en tiu ĉi kant' de l'vespero.

Ŝipet' iras sur la rivero,  
ŝipisto ekstremis de l' kanto,  
kaj blinda por ĉiu danĝero  
rigardas li al la kantanto.

...

Ha, baldaŭ ŝipisto la bela  
perdiĝis sub l' akvoturnado;  
ĝin Lorelej' faris kruela,  
per sia mirinda kantado.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)*

*Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo <http://www.esperanto.mv.ru/Kolekto/Lorelej.html>.*